# Ne estu koko, aliĝu jam al KKPS

La plej bona kuracilo kontraŭ post-Esperanto-renkontiĝa sindromo estas aliĝi al la sekva renkontiĝo. Sed povas esti malfacile elekti inter ĉiuj paskaj renkontiĝoj, aŭ ĉiuj someraj. Sed unu elekto ĉiam estas facila: de la **1-a ĝis la 3-a de novembro** veni Nederlanden por KKPS!

Ĉi-jare ni trovis eĉ pli malinteresan lokon ol pasintjare por organizi eĉ pli mojosan semajnfinon: **Bodegraven**. Laŭ diversaj konspiraj teorioj la urbeto ne ekzistas. Malgraŭ tio la loko troviĝas en bela verda kamparo inter lagetoj kaj riveretoj.




*Ĉu tio ĉi estas Bodegraven?*



*Tiu ĉi foto estas prenita antaŭ la freneza festado.*


En KKPS kiel tradicie estos halovena balo, koncerto kaj ekskurso. Dumtage estos diversaj prezentoj kaj kursoj, kaj dumnokte estos trinkejo kun akoholaĵoj kaj fritaĵoj.



Pliajn informojn vi trovos en nia retpaĝo:

kkps.esperanto-jongeren.nl

Trovu tie kiel alveni, kiel foriri, kiel aliĝi, kiom pagi, kaj kiuj mojosuloj jam aliĝis.



# Pos-Amiko

**Vintro 2018, Numero 27**

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. Trankvila Zamenhoftago
1. TEJO planas aldonajn komitatkunsidojn

2. Nova jarfina renkontiĝo
2. UEA esperas je finna venko

3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo

4. EVENTOJ

## KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko

## Tri novuloj en komato post trankvila Zamenhoftago

La ĉi-jara naskiĝtagfesto de la lingvokreinto denove pasis sen gravaj incidentoj. En diversaj klubejoj estis endormiĝoj kaj problemoj kun projekciiloj, sed tio plejparte ne detruis la etoson. En la pariza klubo kreiĝis nova rekordo pri longeco de flanka gramatika diskuto, kaj en Moskvo du maljunuloj ekbatalis pro incidento dum tutlanda kongreso antaŭ kvardek tri jaroj.

Kiel kutime multegaj novuloj perdis atenton aŭ interesiĝon, sed ĉi-jare tio rezultis je nur tri komatoj pro enuiĝo, kaj du el ili jam revekiĝis. La tutmonda membroperdo ne estas pli granda ol pasintjare.

## TEJO planas aldonajn komitatkunsidojn

En la nova strategia plano de TEJO, prezentota dum tiu ĉi JES, aperas intenco pli ofte organizi komitatkunsidojn. Nun ili okazas averaĝe dufoje jare, sed tio klare ne sufiĉas laŭ la nuna estraro: la nova celo estas averaĝo de unu kunsido monate. Tio ankaŭ helpos al la buĝeto pro haveblaj administraj subvencioj. La laborplano enhavas diversajn ideojn por realigi tion:

- Okazigi du komitatkunsidojn dum JES, po unu en ambaŭ jaroj.
- Malaltigi la necesan kvorumon por kunsidoj.
- Ebligi retan partoprenon en komitatkunsido.

- Havi du kunsidojn samtempe samloke kun samaj homoj.
- Organizi aldonajn kunsidojn en la alvena kaj forira karavanoj.
- Komitatkunsido dum malferma tago de UEA.

## Nova jarfina renkontiĝo por dubantoj

Esperantistoj el Okcidenteŭropo, lacaj post longa trajnkaravano kun naŭ ŝanĝoj al gastejo meze de nenio, anoncas organizajn planojn por nova jarŝanĝa renkontiĝo: la Esperantista Bene Luksa Evento. Laŭplane ĝi ĉiujare alternos inter Nederlando kaj Belgujo. La Pos-Amiko havas ekskluzivan intervjuon kun unu el la organizantoj:

K.P.: "Kial vi decidis organizi tiun ĉi renkontiĝon?"

V.D.: "Mi ĉiam pensis, ke la divido inter JES kaj NE estas tro granda. Por multaj homoj tio estas vere malfacila elekto, kaj ĝuste ilin ni celas per EBLE."

K.P.: "Kiuj organizos la kongreson?"

V.D.: "Por la momento la teamo ekzistas nur el mi. Mi demandis al aliaj pri helpo, sed ankoraŭ ne ricevis respondon. Ĉiuokaze mi ne estas tro okupita kun aliaj aferoj, do mi simple komencos."

K.P.: "Ĉu EBLE konkurencas kun KKPS?"

V.D.: "Mi pensas male, ke ili subtenas unu la alian. Oni povas veni por KKPS kaj resti ĝis EBLE. Mi povas gastigi homojn en tendo en la ĝardeno de mia patro."

## UEA esperas je finna venko

Jam dum kelkaj jaroj ekzistas tradicio dum la Universala Kongreso pri piedpilka ludo inter esperantistoj kaj loka teamo. Kun venontjara UK en Finnujo, jam komencas cirkuli ŝercoj pri 'finna venko', se la esperantista teamo denove tradicie malvenkas. Nun el blogo de eksa UEA-volontulo evidentiĝas, ke tio ĉi estis la sola kialo por organizi la UK-on en Lahti: "Estas tute freneze. La lando estas malvarma, malatingebla, kaj ĝenerale tute maltaŭĝa por organizi la kongreson. Sed la kongresa sekretario tiom obsedas pri tiu stulta ŝerco, ke li aranĝis la piedpilkan teamon eĉ antaŭ zorgi pri la kongresejo. Mi vere esperas, ke ĉi-foje la verda teamo gajnos, nur por detrui la ŝercon."

# NEJ-Novaĵoj!

## NEJ planas organizi la IJK-on 2020

Ĉar ne venis amerika kandidatiĝo, NEJ kandidatiĝas por la IJK 2020. Je lundo la 31-a de decembro en JES la teamo prezentos la planon.

La loko, samkiel en la antaŭa plano, estos gastejo De Hoof en Someren, kiu ofertas lokon por ĝis 400 homoj. Estos multaj programsalonoj, rapidega interreto kaj tute izolita diskejo en la kelo. 20 el 20 kuracistoj rekomendas IJK-on 2020.

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Aĉetu piedpilkŝuojn por ludi kontraŭ la finnoj.

**Taŭro:** Furzu pli por varmigi la amasloĝejon.

**Ĝemeloj:** Ne legu vian horoskopon en publika loko.

**Kankro:** Ne paniku, se neniu pagas vin por tio.

**Leono:** Ĉiam haltu por petveturantaj alpakoj.

**Virgulino:** Post nokto kun malbona varmigilo vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi vojaĝas inter komitatkunsidoj kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Vi povas konservi manĝaĵojn el la bufedo en viaj vangoj.

**Gunnar:** Kunportu ĉokoladon por kontentigi malŝatantojn de la muziko.

**Sagitario:** Kunportu propran dormĉambron por esti certa pri komforto.

**Kaprikorno:** Sekvontjare vi finfine sufiĉe frue komencos paki.

**Akvisto:** Vi malkovras, ke pli grandas domo ol pomo.

**Fiŝoj:** Ne forgesu porti ŝargilon por via robota armeo.

## Sukcesa KKPS en Hunsel

KKPS okazis de la 1-a ĝis la 3-a de novembro en Hunsel. Ĉeestis 52 partoprenantoj el 9 landoj. La loĝejo estis plaĉa, kun tri salonoj en du konstruaĵoj, bona varmigado kaj bonaj kuirejoj.

La kunportita fritilo de Spencer preskaŭ senĉese laboris dum la vesperoj por provizi ĉiujn per fritbuloj, fromaĵoj kaj lumpioj. La haloveno kostumkonkurso unuafoje havis voĉdonadon, kaj gajnis Alina per bela Mantis-kostumo, Jonny M per timiga skeleto, kaj la Huurman-familio per originalaj fantomĉasantoj.

Sabaton posttagmeze preskaŭ ĉiuj iris al ekskurso en la Tekruĉa Muzeo de Swartbroek. Estis ankaŭ eta jubileo: Dmitri disdonis kukon por festi sian 25-jaran Esperantumadon.